

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro / Februaro / Marto 1983



35a IFEF-Kongreso en Ostendo/Belgio **4a ĝis 10a de Junio 1983**



Sipoj majstras la vivon en nia kongresurbo

Somera Oostende – alloga kongresurbo

Belgio vokas vin tiujare al la 35a internacia Esperanto-kongreso de la fervojistoj inter 4a kaj 10a de Junio. Denove kelkcentoj da gekolegaj kaj familianoj el multaj eŭropaj landoj travivos agrablan kunestadon sen lingvaj bariloj. Krome ili konatiĝos kun tiu aminda lando.

La teritorio ne estas granda. Tridek kvadratkilometroj ĝi ampleksas. Belgio estas trafikloko de kulturoj, ĉar vojkruciĝo inter la germana kaj latina mondo, historia trairvojo por sennombraj armeoj kaj bataklampo, jen la vivovojoj de preskaŭ dek miloj da belgoj.

La pejzaĝo prezentas grandan diversecon. Okcidente kaj norde etendiĝas malalta ebenaĵo. En la centro la reliefo progresive plialtiĝas. En la sudorienta parto la monto atingas 700 metrojn. Du riveregoj trafluas: Skeldo kaj Mozo.

Ankaŭ en la historio ne mankas diverseco. La Roma Imperio konkeris la nunan belgan teritorion jam antaŭ pli ol 2000 jaroj. La mezepoko estas markita per la influo de feŭda societo. Urboj ekfloris kaj riĉiĝis. Famaj urboj kiel Gent kaj Bruĝo ekestis siatempe. Ankaŭ en la t. n. burĝonja periodo la evoluo estis simila ĝis 1550. Bedaŭrinde la hispana periodo (ĝis 1714) kondukis pro religiaj bataloj al ekonomia stagnado, kvankam ankaŭ dum tiu tempo oni starigis mirindajn konstruaĵojn, inter ili la Grandan Placon de Bruselo. La sekvaj periodoj, la aŭstra kaj franca, alportis ofte militojn kaj fremdan okupadon ĝis 1814. Dum la nederlanda periodo ekflamis en 1830 la Belga Revolucio, sekve de kiu kreiĝis la Belga Reĝlando. Sub la unua germandevena reĝo Leopoldo la lando progresive industriiĝis. En 1835 instatiĝis la unua fervojo inter Bruselo kaj Meĥleno. Ne estu prisilentite, ke la germana armeo okupis la landon dufoje, en 1914 kaj 1940, vere maldignaj agoj en la 20a jarcento.

La problemoj de la nuntempa Belgio similas al tiuj de la ceteraj landoj en la Eŭropa Komunumo. Eble ili estas eĉ pli grandaj pro la lingva antagonismo, la industria krizo kaj la komplika politika strukturo.

Sed kio interesas nin aparte, estas la kongresurbo Oostende (laŭ flandra skribmaniero), Ostende (laŭ franca lingvo) aŭ Ostendo (esperantigita). La mezgranda, tamen pro ĝia haveno tre grava urbo gastigos dum unu semajno la IFEF-kongresanaron. Meze en la urbocentro leviĝas kiel kongresejo la Festa kaj Kultura

Palaco, kie cetera havas sian konstantan lokon la muzeo por belaj artaĵoj kaj la muzeo popola kaj folkloro. Ĉirkaŭe estas publika placo kun muzika kiosko kaj trotuaraj trinkejoj. Komprenoble ne mankas en la proksimeco restoracioj kaj divers-kategoriaj hoteloj. Kredeble tiu kongreso ne necesigos longajn vojojn, eĉ ne al la vasta strando aŭ al la haveno, de kie startas la ŝipoj al Britio.

LKK vendos kuponojn, kiuj permesos ricevi rapide menuojn en apuda restoracio. Tamen oni estas komprenoble libera manĝi en laŭvola restoracio, escepte de la matenmanĝoj, kiujn inkludas la hotelaj prezoj. Pluaj detalojn indikas la aliiĝilo fine havebla per la distriktkomisiitoj.

Kiel kutime la programo antaŭvidas diversajn laborkunsidojn, al kiuj la kongresanoj preskaŭ ĉiam estos bonvenaj. Espereble la kongresanoj eluzos tiun unikan okazon por informi sin rekte pri la agado en la federacio kaj la landaj asocioj. Ankaŭ la fakprelego promesas esti tre interesa. Por la muziko zorgos ne nur 49 sonoriloj de sur la turo de la kongresejo, sed kontribuos ankaŭ la fervojista blovorkestro de Ostendo, la fervojista folkloro grupo de Antverpeno, la kvarteto de Ramona van Dalsem kaj la nacia fervojista orkestro. Krome okazos kariljona koncerto. Komprenoble ne mankos la internacia balo por la dancemuloj. Ni ne dubas, ke la solena malfermo okazos en digna maniero kun partopreno de alt-ranguloj el la publika kaj fervoja medio.

Neniu kongreso sen ekskursoj, grava elemento recipe por familianoj. Loka Kongresa Komitato ofertas tri sinsekvajn ekskursojn. La unua estos duontaga kaj kondukos al Bruĝo, 25 km for de Ostendo. Tiu urbo konservis sian mezepokan aspekton kaj aspektas kvazaŭ kiel subĉiela muzeo. Ne eblas mencii ĉi tie detalojn pri la abundaj arttrezoroj, pri domoj, palacoj, preĝejoj, turoj, sonorilaroj – anoncu ĉiukaze vian partoprenon. Kunportu krom foto/filmaparato bonajn ŝuojn, ĉar Bruĝon vi devas viziti piede.

Unu tagon poste sekvos ekskurso al Zeebrugge. Tiu loko situas proksime al la

nederlanda landlimo kaj estas la plej granda haveno por fiŝkaptado; de tie veturas pramŝipoj kun vagonoj al Britio, sed la nombro de la sammaniere transportataj aŭtomobiloj estas pli granda, forta konkurenco al la fervojo. La bankvartalo estas malgranda kaj intima. Entute rekomendinda ekskurso al la mara strando.

Tuttaga ekskurso okazos dum la lasta kongrestago. „Tra flandriaj historiaj urboj“ ĝi nomiĝas. Eble en la organo de IFEF oni legos detalojn, kiuj estos la vizitotaj urboj, ĉu la mirinda Antverpeno, scenejo de la lastjara Universala Kongreso de Esperanto, aŭ Gent, la malnova ĉefurbo de Flandrio aŭ . . . — el vidpunkto turista tiu ekskurso prezentos kulminon de la semajno.

Kiu volas profiti de la reduktita kongreskotizo, aliĝu baldaŭ ĝis la 15a de Februaro. Poste oni devos pluspagi 50%. Ne necesas akcenti, ke la antaŭkondiĉoj por partopreni la 35an kongreson de IFEF en Ostendo estas favoraj por germanoj. La distanco inter via loĝloko kaj la kongresurbo estas relative malgranda. Sufiĉe da konvenaj trajnoj estas je via dispono. La kongresa programo allogas kune kun la beleco de Belgio. Do kuraĝigu niajn belgajn gekolegojn kaj aliĝu, se vi ankoraŭ ne faris ĝin. Gis revido en la somera Ostendo!

W.B.

Kongreĝinformacion

Der 35. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten findet vom 4. bis zum 10. Juni 1983 in Oostende (Belgien) statt. Anmeldevordrucke sind bei den Bezirksbeauftragten erhältlich. Mit der Anmeldung wird auch die Übernachtung (4 Kategorien zwischen 20 und 66 DM) und die Teilnahme an 3 Ausflügen (je ein Halbtagesausflug nach Brügge und Zeebrügge, ein Tagesausflug durch Flandern (einschl. Mittagessen) bestellt. Gleichzeitig mit der Anmeldung ist mindestens der Kongreßbeitrag an folgende Anschrift zu überweisen:

BEFA p/a De Sutter Lucien, Chemin des Pins 4, B-1180 Bruxelles, Konto-Nr. 000-0477076-30 beim Postscheckamt Bruxelles. Der Kongreßbeitrag beträgt bis zum 15. Februar 1983 1300 FrB (etwa 66 DM). Für Familienangehörige und Jugendliche unter 20 Jahren wird die Hälfte erhoben. Kongreßteilnehmer, die nicht Mitglied der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten (GEFA) sind,

überweisen 81 DM. Vom 16. Februar an gelten um 50% erhöhte Kongreßbeiträge. Sympathianten werden gebeten, sich ebenfalls anzumelden, auch wenn sie nicht am Kongreß teilnehmen. Sie erhalten gegen Überweisung von 25 DM alle Kongreßunterlagen.

Die Belgische Vereinigung der Eisenbahner-Esperantisten erwartet, daß in Anbetracht der günstigen Umstände eine große Zahl deutscher Kollegen, Familienangehörige, Pensionäre und sonstige Esperantisten am diesjährigen IFEF-Kongreß teilnimmt. Wir geben gerne diesen Wunsch weiter.
W.B.

Tourismus für Esperantisten

(aber auch für solche, die es noch nicht sind)

Vor etwa 2 Jahren fand in Manila eine Weltkonferenz über den Tourismus statt, in deren Schlußkommuniqué der Rolle des Esperanto im internationalen Tourismus ein wichtiger Absatz gewidmet war. Niemand wird leugnen, daß der Tourismus ein ungeheures Ausmaß erreicht hat. Er gehört zum guten Ton und die damit verbundene sprachliche Primitivität und Naivität auch.

Wir Esperantisten haben das Mittel, dieser Primitivität zu begegnen. Nur, wir nutzen es zu wenig. Dieser kurze Bericht soll eine Möglichkeit zeigen, wie wir mit Hilfe unserer Sprache neue Wege gehen können.

Das Esperanto-Zentrum von „Mondaturismo“, das mit UEA zusammenarbeitet, befindet sich in der polnischen Stadt Bydgoszcz (Bromberg). Von da aus werden Erholungsheime und -stätten betreut. Eine solche befindet sich in der Nähe des Eisenbahnknotens Chojnice (Konitz). Es

Atentu!

La ĉi-jara printempa kunveno por laborkomisiono kaj ĉiuj komisiitoj okazos sabaton, la 9an de Aprilo, 11.00 h, en Frankfurt Hbf en la speciala salono (Sonderzimmer) de la IC-restoracio, vidalvide al trakoj 3/4, unua etaĝo. Invito kaj tagordo venos en Marto.

— Pr —

ist ein kleineres Bungalowdorf mit Namen Funka mit knapp 200 Betten in Zwei- und Mehrbettzimmern, bescheiden aber sauber, idyllisch an einem riesigen See inmitten weiter Wälder gelegen. Ein Paradis für Naturfreunde, Pilz- und Beerensammler und besonders für Familien mit Kindern. Und das auch vom Preis her, denn 2 Wochen Vollpension kosten pro Person den Gegenwert von nur 350 holl. Gulden, also etwa 320 DM. Die Stadt Chojnice, bis wohin auch die Fahrausweise zu nehmen wären, ist im halbstündigen Linienverkehr in 20 Minuten zu erreichen. Das Geld wird in deutscher Währung vorher hier eingezahlt.

Zweck dieser Zeilen ist lediglich, zunächst zu erfahren, ob unter unseren Mitgliedern und deren Freunden und Bekannten Interessenten sind, die einen Urlaub in Funka im Sommer 83 in Erwägung ziehen würden. Sie werden gebeten, dies recht bald, jedoch spätestens bis 15. 4. zu melden an: Heinz Schindler, Max-Klein-Str. 21, 5830 Schwelm, Tel. (0 21 25) 1 56 54.

Eine weitere, ähnlich günstige Möglichkeit besteht in Miedzygorze in herrlicher Gegend südlich von Klodzko (Glatz) im August oder September, z.T. von polnischen Kollegen durchgeführt. Auch dafür werden Voranmeldungen entgegengenommen. Einzelheiten können erst später bekanntgegeben werden. Pr

Mi bedaŭras 2 preserarojn en n-ro 5/82: artikolo „Sunradio post diluvo“, paĝo 3, kolumno 1, linio 7: raportanto anstataŭ raporto kaj sur paĝo 7, kolumno 2, linio 11 malsupre mankas la vorto „plenumi“ inter pretas / sian.
Petas pardonon. Via redaktoro

Aus den Gruppen

München

Als neue Mitglieder begrüßen wir recht herzlich BOR Adolf Kneiße, BD München, Versuchsanstalt Freimann und OLOkf Gottfried Sedlmaier, Bw Mühlendorf.

Frankfurt/Main:

Mit einer offiziellen Mitteilung vom 14. 12. 1982 spricht die Stadt Friedberg unserer Vereinigung die besten Wünsche für die Festtage und ein gutes Jahr 1983 aus und verbindet damit den Dank für die

angenehme Zusammenarbeit anlässlich der GEFA-Jahresversammlung vom 15. – 17. 10. 1982 in Friedberg.

Wir geben hiermit die guten Wünsche und die Dankesgrüße an den BSW-Bezirksvorstand, den GEFA-Vorstand, die Teilnehmer und vor allem an alle Helferinnen und Helfer weiter.

Im Anschluß an unser monatliches Treffen am 21. 12. 1982 versammelten sich alle Helferinnen, Helfer und Mitorganisatoren bei der GEFA-Jahrestagung 1982 in Friedberg zu einer Abschlußbesprechung mit geselligem Rahmenprogramm im Clubzimmer des Intercity-Restaurants im Frankfurter Hauptbahnhof. Besondere Anerkennung mit Überreichung eines bescheidenen Präsensts sprach der Bezirksbeauftragte für Esperanto im Namen des BSW den wesentlichen Stützen bei der Vorbereitung und Durchführung der Tagung, Frau Hanni Kiefer und Herrn Walter Ullmann, aus.

Bei angeregter Unterhaltung und mit literarischen Einlagen klang der Abend aus.

Die Ausstellung in Friedberg besuchten während der JV ca. 700, den Informationsstand in der Kaiserstraße ca. 500 Personen. Von den im Bahnhof ausgelegten Informationen wurden ca. 100 Blatt mitgenommen.

Als weiterer Erfolg meldeten sich 8 Interessierte zum Erlernen der Internationalen Sprache. Der von Egon Kiefer geleitete Kurs findet jeden Donnerstag ab 6. 1. 83 im Unterrichtsraum des Bahnhofs statt.

Nürnberg / Lichtenfels:

Am 14. 12. 1982 feierte die Esperantogruppe das Zamenhof-Fest in der Gaststätte „Wallachei“. Hans Müller konnte 28 Mitglieder aus Coburg, Kronach und Lichtenfels begrüßen.

Für die Gäste bedankte sich H. Grötzner als Leiter der Kronacher Gruppe für die Einladung. Hans Müller erstattete einen Bericht über das Gruppenleben. Die Gruppe umfaßt 22 Mitglieder und die Eisenbahner-Esperantogruppe 20 Sprachfreunde.

Das Gedicht „Lied der Vereinigung“ von Dr. L. L. Zamenhof, vorgetragen von Judith Graß, leitete über zum festlichen

Teil. Adalbert Höfer, Leiter der Eisenbahner-Esperantisten, sprach über das Leben des Schöpfers der Internationalen Sprache. Mit der Esperanto-Hymne klang der festliche Teil aus. Anschließend wurden Weihnachtslieder aus aller Welt gemeinsam gesungen.

Den Schluß bildete ein Esperanto-Lottospiel von H. Robel, Kronach, mit Esperantobüchern als Preise für die Gewinner.

Kiel ni nur nun eksciis, mortis la 12an de Junio 1982

inĝ Erwin Böhm (70).

Li jam esperantistiĝis antaŭ la 2a mondmilito. Post la milito li kunlaboris kun Adolf Simon pri terminaraj aferoj. Por la 19a IFEF-kongreso en Fulda li verkis kaj prezentis altvaloran fakprelegon. En jarkunveno kaj IFEF-kongresoj li volonte estis vidita kaj havis multajn amikojn inter la IFEF-anaro. Dum la lastaj jaroj lia sanstato ne plu permesis al li aktivi por la ŝatata Esperanto-movado de la fervojistoj. Ni ne forgesos nian amikon.

— † —

Nia kelkvara membro **Franz Scherak**, Superinspektoro a.D. mortis je la 17.12.1982. La edzino de li, s-ino Helena ankoraŭ vivas kaj loĝas en 8500 Nürnberg 40, Holzgartenstr. 5.

— † —

En pasinta Oktobro forpasis subite pro korapopleksio en la aĝo de 68 jaroj nia samideano

Wilhelm Söhngen.

Dum multaj jaroj li apartenis al la grupo Kassel. Li estis ĉiam tre fervora samideano. Precipe post lia emeritiĝo li partoprenis kelkajn kongresojn. Li ĉiam restos en nia memoro.

Ni esprimas nian sinceran kondolencan al lia fratino.

Li ripozu en paco!

GEFA

Hannover / Bremen:

Am 8.12.82 feierte die Gruppe in der Kantine Bremen Hbf das Zamenhoffest. Herr Feilke spielte Klavier. Den Höhepunkt bildete ein gespieltes Interview mit Dr. Zamenhof.

Internacia Fervojista Sindikato uzos Esperanton

La 1an de Oktobro renkontiĝis en Romo — pere de la Ambasadejo de FRGermanio — grupo da germanaj fervojistoj aliĝintaj al sindikato GDBA-Reisedienst (Hamburg) kaj grupo da estraranoj de la itala fervojista sendependa sindikato FISAFS. Je la fino de la renkontiĝo la ĝenerala sekretario Cassio Pietrangeli, proponis daŭrigi la rilatojn inter la du sindikatoj pere de Esperanto, dank' al la kunlaboro de la fervojistoj esperantistoj, membroj de IFEF. La gvidanto de la germana grupo informos pri tio la estraranojn de sia indikato.

FISAFS intencas starigi internacian fervojistan sindikaton — komence en la Komunuma Eŭropo — kun analogaj sindikatoj (sendependaj rilate la partiojn). Estos intenco, fari Esperanton ĝia laborligvo.

Heroldo 12/82

Rigardo trans la palisaron

Svedujo:

Ĉe la Svedaj Ŝtatformoj (SJ) la elektrizado de la nova 103 kilometrojn longa relvojo de Borlänge al Mora finiĝis. Per tio 7000 km el la tutsveda fervoja reto estas adaptitaj al elektra trakcio. Tio konformas ĉirkaŭ 60 % el la retaro, sur kiu jam 95 % el la tuta trafiko ruliĝas. La elektrizad-projektoj de la SJ, per kiuj oni komencis en 1975, kostis ĝis nun 27,5 milionojn da sv.kronoj.

Nuntempe la trajnoj trafikis sur la nova linio ankoraŭ per rapideco de nur 110km/h. La relvojoj surkonstruaĵoj permesas kompreneble rapidecojn ĝis 140 km/h. Krome la linio disponas pri trajnradiofonio.

Italio:

Novaj sekurec-instalaĵoj por Milano C

Stacio Milano C ĝis fino de la jaro 1982 estas ekipita per plej modernaj sekurec-instalaĵoj. La trajntrafiko de la nuntempe ĉiutagaj 378 en- kaj elveturantaj trajnoj estas nun elektronike gvidata el centra loko.

**Estraro kaj komisiitoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo
Stato: Januaro 1983**

Estraro

Prezidanto: BAR a. D. Giessner,
An der Nicolai-Schule 3, 3420 Herzberg
am Harz, tel. 0 55 21 / 45 86; EDS an
Bf 342 Herzberg (H.), Basa 949/887/144

Vicprezidanto/Redaktoro:

BAR a. D. Grass, Sachsenstraße 7,
8620 Lichtenfels, poŝta tel. 0 95 71 / 64 68
deĵorajn poŝtaĵojn al Gepa 862 Lichten-
fels, Fach 3

Sekretario: BAMtm a. D. Schrapp,
Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf.)
poŝta telef. 02 51 / 31 58 47,
deĵorajn poŝtaĵojn al:
BD-Schule 440 Münster (W.)

Distriktaĵ komisiitoj:

Essen: TBOS Retzlaff, Bf 474 Oelde,
BSW-Fach,

Frankfurt/Main: BAR Kiefer, BSA 600
Frankfurt/Main, AA 341, Basa 955/5656

Hamburg: BHS Böhnke, Bf 240 Lübeck Hbf.
Basa 947/866/374

Hannover: BBI Heimlich, Bf 304 Soltau/H.,
Basa 949/816/386

Karlsruhe: BOS Bernhard, Bf 680 Mann-
heim Hbf, Basa 953/899/1232 aŭ 1238

Köln: BAMtm Herlitze, BD 500 Köln,
Büro B (Ozl); Basa 943/3473

München: Weidacher, Fka/Ga 800 Mün-
chen-Ost; Betreuungsstelle, privata adreso:
Schneefinkenweg 11, 8000 München 82

Nürnberg: TBAR Röder, BD 850 Nürnberg
Th 15; Basa 966/5724.

Saarbrücken: BHS Haupenthal,
BD 660 Saarbrücken, V 26; Basa 956/5475

Stuttgart: TBOAR Krüger,
BD 700 Stuttgart, Bmkr. 3; Basa 952/3125

Apartaj komisiitoj

Administrado de la BSW-financrimedoj:

BHS-in a. D. Elfriede Kruse, Wiener Str. 121
6000 Frankfurt/Main 70, telef. 06 11/65 73 65

Arkivo: BHS Barmaneter, Bf 894 Memmin-
gen; Basa 962/809/357

Biblioteko: BAMtm Rösemann, BD 300
Hannover, Bf 52; Basa 949/1470

Gazet-kolektejo kaj -forluado: BAR Kiefer,
BSA 600 Frankfurt/Main, AA 341,
Basa 955/5656

Bulteno-dissendo: BOS a. D. Schindler
Max-Klein-Straße 21, 5830 Schwelm,
poŝta telef. 0 21 25 / 1 56 54, deĵorajn
poŝtaĵojn al Fka 583 Schwelm

Fakterminaro: LBI Hartig, Bw 280 Bremen 1;
Basa 949/832/365

BOAR Ritterspach, ZVL 650 Mainz,
AA 8202, Basa 954/5533;

Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:

BAR Lautenbach, Bf 640 Fulda;
Basa 957/822/120 aŭ 955/822/120.
Privata adreso kaj poŝttelefonnumero:
Abtstor 21, 6400 Fulda, (06 61) 7 76 27.

Kasisto: BOS Bernhard, Bf 680 Mannheim
Hbf, Basa 953/899/1232 aŭ 1238

Specialaj taskoj: TBAR a. D. Brandenburg,
Brinker Damm 24, 4404 Telgte 2 - West-
bevern; deĵorajn (ne urĝajn) poŝtaĵojn al:
DB-Schule 440 Münster (W.)
BOAR Barnickel, ZVL 650 Mainz, AA 8402,
Basa 954/5537

Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Ĉi tie ni komunikas la aktualan adresaron
de la GEFA-estraro kaj de la komisiitoj.
Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale
ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii
la akuratan akcepton.

Redaktfino por n-ro 2/83 estas la 1. 4. 1983

Aŭstralio:

Trajnoj per 160 km/h

Ankaŭ en Aŭstralio trafikos estonte
specialaj rapidtrajnoj. Tiucele oni mendis
kvar sep-elementajn rapid-motortrajnojn
laŭ la brita modelo HST (High Speed
Train). La du veturilkapoj de tiuj trajnoj
estos ekipitaj per dizelaj motoroj, kiuj
kune produktas povumon de 3000 kW. Ili
trafikos per rapideco de 160 km/h kaj
servos 48 survoĵajn staciojn en
Novasudkimrujo.